



E
juna
amiko

**Feliĉan novan
jar(cent/mil)on 2000!**

INTERNACIA ESPERANTO-REVUO DE
POR LERNEJANOJ KAJ KOMENCANTOJ

ILEI

DECEMBRO 1999

N-ro 4 (91)

Pri la lingv'ajo kaj ortografio de juna amiko

Sen pied'notoj ni uzas nur la plej oftajn 1500 vortradikojn. Tiuj ĉi vortoj aperis en: **Esperanto, Minimum szótár** (1995), kiu jam plene elĉerp'igis. Nun ili estas alir'eblaj ĉe Interreto, en la hejmplaĝo de Juna Amiko: <http://www.banyai-kkt.sulinet.hu/esperanto>

Krom-signoj, kiuj helpas komenc'antojn:

Divido-streko(-) troviĝas inter la elementoj de vort'kun-metoj, kiam ne mankas fin'ajo, ekzemple: tablo-tuko, el-iri ...

Vertikala strek'eto (^) signas mankon de fin'ajo: bild'karto, verd'igi ...

Kiam io helpas la rekonon, kiel ekzemple: tuttaga (tt) aŭ la vorto revenas en la sama artikolo aŭ kiam la vorto estas tre kon'ata jam por komenc'anto (esperantisto, patrino ...) ni ne uzas kromsignojn.

Vi ofte trovas komojn (,). Ankaŭ per tio ni deziras helpi komencantojn.

1. regul'aro de la ĝusta skribo



**Sur la titol'paĝo:
Albana knabo
en tradicia
popola kostumo**

Sojle¹ de la jaro 2000

Ekzistas pluraj kalendaroj² en la mondo, unu el ili nun montras la jaron 1378, la alia jam 5760, tamen la plej vaste uz'ata nuntempe estas la Gregoria Kalendaro, kiu baldaŭ atingos la finon de la mil naŭ-centaj jaroj. Ni, kiuj mezuras la tempon per tiu ĉi kalendaro, al-kutim'igis ke ĉiu-jare ŝanĝig'as la lasta cifero en la jar'dato, post pluraj jaroj ŝanĝig'as la du lastaj ciferoj, kaj kelkaj mal-jun'uloj povas "fieri", ke en ilia viv'daŭro ŝanĝig'is tri ciferoj, sed certe neniu el ni povas diri, ke ŝanĝig'is ĉiuj kvar ciferoj. Konsider'inda okaz'ajo, sen-dube, malgraŭ ke ni konscias, ke ĉiu tempo-komenco estas arbitra el-pens'ajo.

Dum oni disputas: ĉu per 2000 fin'ig'as la 2-a jar'milo (laŭ matematik'istoj) aŭ komenc'ig'as la 3-a (laŭ multaj historiistoj), ni ĝoju, ke ni ĝis-vivis ĉi tiun jaron, malgraŭ tio, ke la hom'aro faris preskaŭ ĉion eblan por mort'igi sin kaj sian ĉirkaŭ'ajon.

Estus plej bone kaj inde al radika ŝanĝo de ĉiuj ciferoj se, fin'fine, ankaŭ la mondo povus sin ŝanĝi pozitive, se ĝi demetus ĉion mal-racian, ĵetus al rub'ejo mal-toler'emon, mal-just'econ, mon-kaj potenc'avidon. Estus bone, se ni proksim'ig'us ne nur teknike, sed ankaŭ anime. Tion mi deziras al ĉiuj hom'fratoj tra la tuta mondo kun aŭ sen "nia" kalendaro.

Geza Kurucz
redaktoro

1. ĉe la pordo / 2. tempo-kalkul'iloj.



Por re-memori pri **Aleksandr Sergejevič PUŜKIN**, la plej granda rusa poeto¹, la kre'into de la moderna rusa literatura lingvo, kiu nask'iĝis antaŭ 200 jaroj, ni publik'igas la plej kon'atan am'konfesion el lia romano en versoj "Anjegin". Ni uzas la tradukon de nia el-stara literatur'isto, **Kolomano Kalocsay** [Kaloĉaj]. Ni pruntis ĝin el "Tut'monda Sonoro", Poezia² antologio³ en Esperanto, traduk'ita el 30 lingvoj.

1. poem'verk'isto / 2. poezlo: vers'arto / 3. kolekt'ajo el la plej belaj verkoj de poeto(j) aŭ epoko aŭ stilo / 4. ŝajne aproba tono por tranĉe moki.

200

1799-1999

Letero de Tatjana al Anjegin

*Mi skribas al vi – kio plia?
Ĉu vortoj diri povas pli?
Mi scias: nun per ironia⁴
mal-ŝat' min puni rajtas vi.
Sed vi, se havas vi pri mia
mizer' eĉ guton da kompat',
min ne for-lasos en ĉi stat'.
Komence volis mi silenti,
kredu, neniam el ĉi font'
ek-scius vi pri mia hont',
se povus mi esperon senti,
ke mi vin vidos – iam ajn,
eĉ se nur tagon dum
semajn'
por aŭdi vin, kaj je
respondo
okazon havi, kaj – dum tag'
kaj nokto – revu en imag'
pri vi ĝis nova
ek-renkonto.*

En tiu ĉi rubriko ni publik'igas bildojn el nia literatura heredaĵo per la plumo de nia kun-labor'anto, el-stara islanda poeto, **Baldur RAGNARSSON**. Konsciuj, ke sen bazaj scioj pri nia historio kaj literaturo oni ne povas fariĝi cel'konscia esperantisto, sukcesa pled'anto por nia nobla ideo. (Red.)

7

En la lastaj du numeroj mi parolis pri la verkoj de ZAMENHOF. Mi substrekiis la grav'econ de liaj verkoj por la ek-evoluo de la Esperanta literaturo. Lia verkaro estas kaj abunda kaj diversa. Liaj originalaj² verkoj koncernas la lingvon mem, la Esperanto-mov'adon kaj beletron³. Junaj esperantistoj devas frue kon'at'iĝi kun liaj malmultaj poemoj, kiuj okupas ian sanktan lokon en nia tradicio. Kaj, iom post iom, ili devas legi ankaŭ liajn prozajn⁴ verkojn. Mi volas aparte atent'iĝi pri la ok parol'adoj, kiujn li faris okaze de inaŭguroj⁵ de la Universalaj⁶ Kongresoj 1905-1912.

Por akiri klasikan stilon de klar-eco kaj riĉa en-havo pleje indas zorgi legi tiujn paroladojn. Tio ne signifas, ke vi nepre provu imiti la stilon de Zamenhof. Sed profunda kono de lia stilo estas la fundamento, sur kiu vi povus evolu-

igi vian propran stilon – se vi deziras fariĝi verk'isto en Esperanto.

BILDOJ EL LA HISTORIO

8

Sed nun mi volas turni min al alia grava verkisto el la fruaj jaroj de Esperanto. Sed, unue, mi deziras rakonti al vi memor'aĵon el mia propra esperantista vivo. Mi ek-lernis Esperanton en mia 17-a jaro. Baldaŭ poste mi hazarde ek-havis mian unuan beletran libron en la lingvo. Ĝi estis poem'aro kun la titolo *El Par-naso de Popoloj*, el-don'ta en Varsovio en 1913. Tiu poemaro enhavas ses originalajn poemojn de la polo **Antoni GRABOWSKI** kaj liajn tradukojn de poemoj el 30 lingvoj. Ĉiun poemon akompanas



signoj por montri la metrikan⁷ takton⁸ kaj ĉiu traduk'ita poemo estas en-konduk'ita per kom-

si lian lokon en mia koro. Tiom forta estis tiu jun'eca impresio¹¹.

Sed kiu estis GRABOWSKI? Li estis polo, naskiĝis en 1857, mortis en Varsovio en 1921. Profesie li estis kemia inĝeniero¹² kaj verkis fakajn librojn en la pola lingvo. Li estis poligloto¹³, kiu konis kaj regis pli ol dudek lingvojn. Li tradukis, en

LITERATURO DE LA ESPERANTA

encaj versoj en la originala lingvo. La tuta aspekto de la libro el-spiris por mi ian seriozan aŭtentikon⁹, kiu vekis profundan respekton por la lingvo, kiun mi estis lern'anta. Tiom forta estis la altir'povo de tiu libro, ke mi tuj devis provi ek-legi kaj kompreni, kvankam mi fakte ne estis tiam fin'inta la lerno-libron mem! Kaj mallonge dir'ite: Tiu poemaro de GRABOWSKI incisis¹⁰ min definitive en la lingvon, en ĝian spiriton kaj ĝiajn respekt'indaj meritojn. Ĉiam poste mi amis GRABOWSKI, kaj neniu alia Esperanta verkisto sukcesis for-preni por

tre mal-facilaj cirkonstancoj¹⁴ de mal-sano kaj sol'eco, la nacian epopeon¹⁵ de la Poloj, *Sinjoron Tadeon*, en Esperanton. Laŭ-dire, la unua inter-parolado en Esperanto okazis, iam en 1888, inter Grabowski kaj Zamenhof, en la loĝ'ejo de Zamenhof ĉe strato Dzika numero 9 en Varsovio. Tiuj du fariĝis intimaj¹⁶ amikoj, kiuj spirite subtenis unu la alian.

Jes, GRABOWSKI estis ja unuavice traduk'isto. Tamen, pro la grav'eco de liaj poeziaj¹⁷ tradukoj oni kutime nomas lin "la patro de la Esperanta poezio". Liaj originalaj poemoj estas mal-

multaj. Tamen unu estas same bone konata inter la esperantistoj kiel *La Vojo* de Zamenhof. Ĝi nomiĝas *La Tag'igo*. Ĝi estas movada poemo kiel la poemo de Zamenhof. Ankaŭ ĝin oni ofte kantas je solenaj¹⁸ okazoj (laŭ muziko de la pola kompon'isto *Baranski*). La poemo esprimas la optimisman¹⁹ entuziasmon²⁰ de la poeto pri la lingvo. La tono diferen-

cas de la Zamenhofa en *La Vojo*: Zamenhof antaŭ-vidas longan kaj pen'igan laboradon por venk'igi la lingvon:

*L'espero, l'obstino kaj la pacienco
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro
Atingos la celon en gloro.*

Grabowski vidas la venkon de la lingvo jam en tuja proksimo:

*En ĉiu mond'parto, en ĉiu ter'zon',
En koroj de centoj da miloj,
Jam vibras²¹ por nia saluto re-son',
Do kantas de l' tero ni filoj:
Tagiĝo, tagiĝo radias en rond',
La ombroj de nokto for-kuras el mond'!*

1. tio, kion oni ricevas de antaŭuloj / 2. ne traduk'itaj, verk'itaj rekte en tiu lingvo / 3. belliteraturon / 4. ne versajn / 5. feste aranĝ'itaj mal-fermoj / 6. tut'mondaj / 7. metriko: scienco pri vers'tekniko / 8. mezuron / 9. ne-dub'eblan veron / 10. en-kondukis en scion pri io pli-malpli sekreta / 11. efiko sur la sentoj, koro, spirito / 12. tiu, kiu science direktas teknikan laboron / 13. parol'anto de multaj lingvoj / 14. kondiĉ'aro / 15. tre longan poemon pri heroo(j) / 16. spirite tre proksimaj / 17. poezio: arto esprimi pensojn kaj sentojn per poemoj / 18. feste aranĝ'itaj / 19. fid'eman je sukceso / 20. plezura sin-don'emo al io / 21. rapid'ege mov'et'iĝas tien kaj reen.

Se vi havas al-iron al Interreto, ne preter-pasu nin.

De tempo al tempo

VIZITU LA HEJM'PAĜON DE JUNA AMIKO

<http://www.banyai-kkt.sulinet.hu/esperanto>


Jen vidu, abon'prezoj por la jaro 2000 restas sen ŝanĝoj!

	NLG	Eŭro	DEM	USD	2-4 abonoj	Ekde 5	Aere
Tarifo 1	24	10,80	21	13	-33.3 %	-50 %	en la prezo
Tarifo 2	13	6	12	8	-33.3 %	-50 %	+20 %
Tarifo 3	9	4	8	5	-20 %	-30 %	+20 %
Hungario	600 HUF				Po 480 HUF	420 HUF	—



GBEGLO Koffi

INSTRU SISTEMO EN TOGO LANDO



Ĉar pluraj lernejoj el Togolando partoprenas en INTERKULTURO, indas, ke vi sciu ion pri la instrusistemo de la lando kaj pri la cirkonstancoj¹, inter kiuj ni laboras.

VIZITI LERNEJON NE ESTAS DEVIĜE EN TOGOLANDO

● EKZISTAS KVAR GRADOJ

La *elementa (baz'grada) lernejo* akceptas lernantojn 6-15-jarajn. La stud'ado daŭras ses jarojn. Estas al-don'inde, ke kelkaj elementaj lernejoj havas ankaŭ infan-vart'ejon², kie la buboj³ pas'igas de unu ĝis tri jarojn antaŭ ol en-iri baz-lernejon.

Fin'inte elementan lernejon, la lernantoj povas daŭr'igi la studadon en *dua-grada (mez'grada) lernejo*, nom'ata *kolegio*, kie la studado daŭras kvar jarojn. Vizitas ĝin, grand'parte, geknaboj de 10 ĝis 20 jaroj. Estas sciinde, ke lernantoj, kiuj fin-studis en elementa lernejo kaj kies aĝo estas inter 9 kaj 15 jaroj rajtas daŭrigi siajn studojn en ŝtataj duagradaj lernejoj, la ceteraj devas lerni metion aŭ viziti privatajn lernejojn.

Akir'inte diplomon⁴ en duagrada lernejo, la lernantoj povas plu-studi en *liceoj*. Tio estas la *tria grado*. Tie la lern'ado daŭras tri jarojn kaj povas ĝin viziti ge-jun'uloj en la aĝo de 14-20 jaroj.

La *kvaran gradon* formas superaj lernejoj: *universitatoj*, *alt'lernejoj* por instruistoj, profesoroj ktp. (=kaj tiel plu). La ŝtato helpas la lernantojn, sed helpojn ricevas preskaŭ nur fin'stud'intoj de tria-gradaj lernejoj, kies aĝo ne superas 25 jarojn. La studo-daŭro, kiu de-pendas de la elekt'ita fako, havas almenaŭ du jarojn.

● KION ONI INSTRUAS EN LA LERNEJOJ?

En la elementa lernejo oni instruas nur ĝeneral'ajojn. De la dua- ĝis la kvara-gradaj lernejoj ekzistas iuj, kiuj dispon'igas⁵ lern'objektojn ankaŭ fakajn. Oni povas lerni, ekzemple, pri administr'ado⁶ kont'ado⁷, elektroniko⁸, mekaniko⁹, ktp.

Ne preter-vid'inda estas la fakto, kiel mi menciis supre, ke la ŝtato dev'igas nenium viziti lernejon. La regist'aro iel helpas, por ke ĉiu povu lerni, sed la lerno-kotizo¹⁰, kvankam eta, estas mal-facile akir'ebla por multaj gepatroj, sekve, multaj infanoj ne povas lernejan'iĝi.

● GRANDEGAJ KLASOJ

Tute alia problemo, kiu mal-facil'igas la lernadon estas la nombro de la lernantoj en la klasoj, la situacio de la instruistoj, la stato de la lernejoj, la manĝ'ado de la lernantoj, ktp: la viv'kondiĉoj de la lernantoj kaj instruistoj. Paroli pri tio ĉi postulus multe da paĝoj. Okazo alia prezent'iĝos por tiuj, kiuj partoprenas en INTER-KULTURO, kiu ebl'igas al la partopren'antoj scii ĉion pri tiuj kondiĉoj en multaj landoj.

×

PRI CEG ANFAME

Ankaŭ Togolando partoprenas en la projekto INTER-KULTURO. Ceg Anfame estas kolegio. Tie mi instruas kaj ni al-iĝis al la projekto¹¹. Estas, do, grave, ke la kolegio Ceg Anfame sin prezentu.




Foto pri lernejo en Togolando

Promen'ante de urbo al urbo, de vilaĝo al vilaĝo, de kamp'aro al kamparo, oni rimarkas, ke lernejoj en urboj estas pli aĉaj ol iuj en kamparoj. Komuna trajto de ĉiuj lernejoj estas, ke unu sola instruisto pri-zorgas lernantojn inter okdek kaj cent kvindek. Tio klare montras, ke mankas lernejoj kaj instruistoj. Ĉu en tiuj cirkonstancoj la laboro povas esti efika?

Kolegio Ceg Anfame mal-ferm'iĝis en la lerno-jaro 1997-98. Ĉar ĝi ne havis konstru'ajon, la lernantoj posttag'meze devis okupi ĉambrojn de alia kolegio, kies lernantoj restis hejme posttagmeze. Niaj kolegi'anoj havis, do, lecionojn nur posttag'meze, maksimume¹² 3 lecionojn, dum laŭ la normala¹³ programo ili devus havi almenaŭ 5 lecionojn.

En la lernejo 1998-99 Ceg Anfame loĝis en la elementa lernejo Denivime, kiu cedis sian detru'otan hurd'ajon¹⁴ al la kolegio. Necesus esti en la klasĉambro por sperti ties taŭg'econ. Jam je la oka horo matene la temperaturo superas 35 gradojn. Ĉiuj, lernantoj kaj instruistoj, ŝvitas, sed faras sian laboron. En pluva tago la klasĉambroj trans-form'iĝas en lagon. Iam, post pluvo, lernanto skribis sur la tabulo de la klasĉambro: "Nia klasĉambro fariĝas lago, ni, la lernantoj estas nun

fiŝoj, dum la benkoj transformiĝas en pirogojn¹⁵ kaj la instruistoj en fiŝ'istojn". Tamen la kurso daŭris ĝis la fino de la lernejo.

Kie trovi lokon por la ven'onta lernejo? La hurdaĵoj agonias¹⁶ kaj la lernantoj, kiuj estis pun'itaj dum la lernejo, promesis detruĵi ĉion dum la ferioj (aŭgusto-septembro).

En tiu lernejo nun mi instruas. Se iu konas organiz'ajon, kiu povas helpi en la konstru'ado de taŭgaj klasĉambroj, tiu kontaktu Esperante la direktoron de la lernejo: *Directeur du Ceg Anfame, s/c Iredd Golfe, B.P. 80252, Lomé-Togo.*

La stato de lernejo kondiĉas la lern'emon de la lernantoj. Kia lernejo, tia rezulto.

GBEGLO Koffi, instruisto pri matematiko en Ceg Anfame (Lomé-Togolando)

1. detalaj apart'ajoj kiuj akompanas agon, fakton / 2. varti: gardi kaj pri-zorgi / 3. petolaj knaboj / 4. oficialan atest'ilon / 5. hav'igas ion, kion oni povas uzi / 6. administri: pri-zorgi aferojn / 7. kont'adi: komerce pri-zorgi ŝuldojn aŭ havaĵojn / 8. tekniko, kiu uzas la proprecojn de elektronoj / 9. parto de fiziko, kiu studas movojn, fortojn / 10. sumo, regule pag'enda por io, iu / 11. ideo efektiv'ig'ota / 12. ne pli multe / 13. ordinara, kutima / 14. hurdo: branĉo-plekt'ajo / 15. simplegajn akvo-vetur'ilojn kiujn oni faris el arbo-trunkoj / 16. estas mort'ontaj.

PIEDNOTOJ de "Pri la utilo de mal-kuraĝo"

1. fabel'eca best'ego kun serpenta vosto / 2. krokodil'simila ramp'ulo / 3. el-igis daŭran altan sonon kiel serpento / 4. svingi: rapide kaj ripete mov'eti en la aero / 5. grand'egaj / 6. grandegaj pra-bestoj / 7. ĝusta respondo al la postuloj de la tempo, kutimo, ktp. / 8. alt'rangajn sinjorinojn / 9. Ruĝa Libro: listo kun protekt-ataj bestoj for-mort'ontaj / 10. firma cert'eco pri sia volo / 11. mal-saĝ'uloj / 12. malgranda vigla ramp'ulo kun longa vosto / 13. mal-grand'ega.

V. Suĥomlinova

Pri

la

UTILO

de

mal
kuraĝo

(Fabelo ne nur pri fabeloj)

Vivis iam drako¹, malgranda, griza, unu-kapa. Eĉ ne drako, nur drak'eto ia.

— Varano², griza varano, — diris homoj, kiam ili renkontis ĝin.

— Ne, drako, drako, — insistis la draketo kaj komencis kontraŭ-atakon. Ĝi ek-staris sur siaj kurbaj kruroj, siblis³ kaj sving'egis⁴ per la vosto. Tiam ĝi forgesis, ke ĝi estas

nur eta parenco de la kolosaj⁵ dinsaŭroj⁶. Ne, ĝi estas drako sen timo kaj riproĉo. Ĝi ...

Ver'sajne oni kredis al ĝi. Almenaŭ oni batalis kontraŭ ĝin kiel kontraŭ drakon. Kaj oni ankaŭ venkis ĝin kiel drakon, en plena konformo⁷ al la fabela real'eco. Laŭ la tradicio, ni diru.

Kaj jen iom pri la tradicio.

La drakoj havis malbonan kutimon forrab'adi princ'inojn⁸ Vasilisajn (prefere la belajn). Ver'ŝajne pro tio ĉiam mal-amis ilin Ivanoj, kiuj ankaŭ havis malbonan kutimon: jen tuj kaj per glavo, ek! Kaj tiel komenciĝis: unuj rabas, aliaj la kapon for-hakas. Menciindas, inter-alie,

raktero al-kondukos min ĝis la Ruĝa Libro.

Kaj vere, ĝi alkondukis.

Sed ne obstino¹⁰ draka estas la kialo. Oni ne vidas teruran drakon en la varano, sed oni mort'igas



ke Ivanoj ĉiam atakis kaj la drakoj neniam cedis. Ankaŭ tio iĝis tradicio. Tiel for-mortis drakoj, eĉ ne ating'inte la Ruĝan Libron⁹.

For-pasis ilia tempo. Nun-tempe, laŭ-moda iĝas malkuraĝo. Resiti viva povas nur tiu, kiu ĝustatempe cedas, pli rapide for-kuras kaj pli sekure sin ŝirmas. Nur la eta griza drako ne re-tir'iĝas kaj ne kaŝ'iĝas. Tio estus ne laŭ-draka konduto.

— Ho, griz'eco mia! — ĉagreniĝas ĝi post la batalo. — Mia ka-

ĝin pro timo. Ferm'inte okulojn — ek al la kapo, por ke ĝi ne plu timigu. Aŭ, eble, la varano ne havas bon'sancon — el ĉiuj Ivanoj nur stult'uloj¹¹ renkontas ĝin?


Tiel aŭ alie sed, se la aferoj same iros, ne-longe vivos varano en la Ruĝa Libro; ĝi plene foriros al la fabelo. Tie, en la fabela ne-real'eco, ĝi ĉesos esti granda lacerto¹² kun eks-mod'iĝ'inta raketero, kaj iĝos nur nana¹³ draketo kun pri-plor'inda sorto.

Tr.: Tatjana AUDERSKAJA, Ukrainio

Jam de kelkaj jaroj, la ŝtatoj de Eŭropa Unio (EU) planas en-konduki komunan monon. Ĝia nomo estas "eŭro". 1 eŭro egalas 100 cendojn.

Eŭro

NOVA MONO POR EŬROPO



Komence de la jaro 1999 okazis la unua paŝo. Temas pri 11 landoj (Aŭstrio, Belgio, Finnlando, Francio, Germanio, Hispanio, Irlando, Italio, Luksemburgio, Nederlando kaj Portugalio), kiuj inter-konsentis enkonduki la novan monon. En tiuj landoj vi nun povas decidi, ĉu havi konton¹ en landa valuto² aŭ en eŭroj. Eble vi jam rimarkis, ke ankaŭ en Esperantujo (UEA kaj aliaj) oni anoncas la prezojn (ekzemple gazeto-abonoj, libro-servoj) en eŭroj. En tiuj landoj, vizitante grandajn vendejojn vi trovas la prezojn en du valutoj: en la nacia kaj en eŭroj. Tion oni faras por al-kutimigi la loĝantojn al la nova mono. La novajn monerojn kaj monbiletojn oni enkondukos en januaro de 2002 kaj, fine, en julio de la sama jaro ĉesos plu ekzisti la unu-opaj naciaj monoj.

Kompren'eble, oni jam decidis pri la aspekto de la monbiletoj kaj moneroj. Ni volas prezenti al vi la novan monon. Ekzistos monbiletoj de 5, 10, 20, 50, 100 kaj 500 eŭroj. Ĉiu el la sep monbiletoj prezentas unu epokon de la eŭropa kultur'histrio. Ne temas pri vere ekzist'antaj konstru'ajoj, sed pri unuopaj konstru'stiloj, kiuj ekzistas en Eŭropo. La antaŭa flanko montras fenestrojn kaj pordojn kiel

signon de mal-ferm'il'eco kaj kunlaboro en Eŭropa Unio. La alia flanko montras pontojn kiel signon de inter-ligo inter la popoloj de Eŭropo.

Diference de la monbiletoj, kiuj estos unu-ecaj por ĉiuj landoj, la eŭro-moneroj (1 kaj 2 eŭroj) havos nur unuecan antaŭan flankon, la dorsa flanko malsamos laŭ unu-opaj landoj: Aŭstrio – komponisto³ Mozart, Belgio – reĝo Alberto II, Finnlando – cigno, Francio – stiligita arbo, Germanio – aglo⁴, Hispanio – reĝo Juan Carlos, Irlando – harpo⁵, Italio – La homo, bildo de Leonardo da Vinci, Luksemburgio – grandduko⁶ Jean, Nederlando – reĝino Beatrix kaj Portugalio – la antikva skribo de Portugalio.

lom-ete alia estos la aspekto de la cendo-moneroj. Ankaŭ ĉe ili diferencos la dorsa flanko laŭ-lande. Ekzistos moneroj de 1, 2, 5, 10, 20 kaj 50 cendoj.

Ni esperas, ke ĉio sukcesos laŭ la planoj de EU kaj, se ĉio bone funkcios, en la estonteco, certe, pliaj landoj akceptos la komunan monon.

Dieter BERNDT, Germanio
Vidu la lastan paĝon

1. skriba kalkulo de havaĵoj kaj ŝuldoj en banko / 2. mono de unu-opaj landoj / 3. muzik'verk'isto / 4. granda rabo-birdo / 5. granda muzik'ilo kun kordoj / 6. duk: titolo de reg'anto.

PRI LA HEBREA KALENDARO

Nun-tempe, kvankam tra la tuta mondo oni uzas ĉefe unu kalendaron¹, la Gregorian, multaj popoloj paralele² uzas propran kalen-daron, precipe por indiki³ la datojn de religiaj festoj. Tia estas ankaŭ la hebrea⁴ kalendaro. Ĝi estas uz'ata de la judoj por festi siajn religiajn festotagojn. Ĝi estas ankaŭ oficiale uzata en Israelo, paralele al la ĝenerala kalendaro.


Luna kaj suna kalendaroj

Dum la ĝenerala kalendaro dependas de la suno – jaro egalas tempon, kiun bezonas la Tero ĉirkaŭ-iri la sunon (365,26 tagoj) – la hebrea kalendaro estas baz'ita⁵ je la luno. Ĝia ĉefa tempo-

unuo estas la luna monato, la periodo, dum kiu la luno rond'iras la Teron. Tio daŭras proksimume 29,5 tagojn. Tial la hebreaĵ monatoj havas alterne⁶ 29 kaj 30 tagojn kaj la tuta jaro – 354 tagojn.

Agrikulturo⁷ kaj festotagoj

La ĉefa celo de la kalendaro, en la antikva⁸ tempo, estis sekvi la gravajn datojn por agrikulturo: kiam semi, kiam planti, kiam akv'umi, kiam rikolti. Alia grava celo estis indiki la datojn de gravaj religiaj festoj, sed ankaŭ ili, grand'parte, estis lig'itaj al agrikulturo.



Korekt'ita lun'kalendaro (13-a monato)

La agrikulturaj datoj estas fiksitaj de la sezonoj, kiuj dependas de la mov'iĝo de la Tero ĉirkaŭ la suno, do, de la suna kalendaro. Ĉar la luna jaro havas 11 tagojn malpli ol la suna, akumul'iĝas⁹ mal-fruo, kaj por korekti la daton laŭ la sezonoj oni al-donas ĉiun trian jaron kroman monaton kaj tiam la jaro havas

13 monatojn. Tio estas iom simila al la aldono de unu tago al februaro ĉiun kvaran jaron. Pro tiu korekt'ado, la judaj festoj okazas ĉiam proksim'ume en la sama sezono (tamen ne precize¹⁰ en la sama dato laŭ la suna kalendaro; la diferenco inter la du kalendaroj varias kun ciklo¹¹ de 19 jaroj).

Kiam ŝanĝ'iĝas la jaro kaj la tago?

Nova jaro komenciĝas en aŭtuno, la nuna jaro 5760, ekzemple, komenciĝis la 11-an de septembro 1999. Nov'jaro estas du-taga festo ĉe la judoj.

En la ĝenerala suna kalendaro la dato ŝanĝ'iĝas mez'nokte. En la hebrea kalendaro tio okazas vespere, la tago komenciĝas, kiam aperas la tri unuaj steloj.

Kiun kalendaron oni uzas, nuntempe, en Israelo?

Ŝtato, komerco kaj la ĉiu-taga vivo, kutime, uzas la ĝeneralan sunkalendaron. Sed por judaj festoj, kiuj estas ŝtataj ripoztagoj, kaj ankaŭ por fiksi la lernojaron kaj por festi la religi-

ajn dat're-venojn, kiel ekzemple la "Bar Micva" – la 13-a naskiĝtago, kiu indikas la matur'iĝon de knaboj, oni festas en la dat'reveno laŭ la hebrea kalendaro.

Amri WANDEL, Israelo

1. tempo-kalkul'ilon / 2. ĉi tie: sam'tempe / 3. liveri bezon'atan sciigon / 4. hebreo, judo: popolo en Israelo kaj en pluraj landoj de la mondo / 5. bazo: tio, sur kio estas konstru'ita io spirita, io grava / 6. sin-sekve du elementoj ŝanĝas sin / 7. ter'kultur'ado / 8. mal-nov'ega / 9. amas'iĝas (ĉi tie) el rest'intaj tagoj / 10. ĝuste kaj klare difin'ite / 11. egala periodo, kiu post certa tempo revenas.

Ha-lo! Ĉu estas vi, Petro?

Ĉu vi scias, ke unu el la plej oftaj vortoj de nia moderna epoko de telekomunik'ado: "ha-lo" venas el la hungara vorto: "hallom" (= mi aŭdas vin). Kiam *Tivadar PUSKÁS* [Puŝkaŝ] prezentis sian invent'aĵon¹, la telefoncentralon², kun siaj kolegoj³ li komunikis jene: "Hallod?" (= ĉu vi aŭdas min?), "Hallom!" (= mi aŭdas vin). La lern'emaj okcident'eŭrop'anoj tuj alpropr'igis la "magiajn"⁴ vortojn de telefonado.

Zoltan KURUCZ, Hungario



1. inventi: el-pensi ion novan / 2. centra, ĉefa servo-loko / 3. kun-labor'anto / 4. hav'antajn preskaŭ super-naturajn fortojn.

Ni plen'umis la deziron de multaj leg'antoj, kiuj petis la redakcion aper'igi en ĉiu numero kvizon kun pli-malpli facilaj task'etoj egale taŭgaj por komenc'antoj kaj progres'intoj. Per ĉiu task'aro vi povas akiri 30 poentojn. Post la decembra numero de Juna Amiko ni senpage abon'igas al nia revuo tiujn, kiuj laŭ siaj poentoj staras ĉe la pinto.

KONSTANTA KONKURSO POR MI en



Karaj geamikoj, kapt'itaj de konkurs'emo, legu la ĉi-subajn informojn, kiuj donas al vi utilajn konsilojn.

Se vi estas nova konkurs'anto, t.e. (= tio estas) vi ankoraŭ ne sendis viajn solvojn al nia redakcio, sciu, ke oni povas komenci la konkurson iam ajn, ĉar post ĉiu numero ni aparte taksas la rezultojn, kiel vi vidas sube. La tuta listo troviĝas en nia hejmpaĝo (www.banyai-kkt.sulinet.hu/esperanto) kune kun la regul'aro.

Se vi havas emon konkursi, venu kaj kontrolu viajn sciojn. Ni esperas trovi vian nomon inter la konkursantoj jam en la marta n-ro. Ne hezitu!

Se vi estas nia aktiva konkurs-anto, sciu, ke la apuda taskaro (n-ro 3) estas la lasta en la konkurso-jaro. En februaro (post la limdato de n-ro 3) ni sum'igos la poentojn, akir'itajn en 1999 kaj publik'igos la finajn rezultojn de la konkurso. En la revuo ni povas prezenti, kompreneble, nur la pinton de la listoj. La ceteraj trovas siajn nomon kaj lokon en nia hejmpaĝo (vidu apude!) sub la vorto KVIZOLISTO. Ne forgesu viziti ĝin kaj abonon por la jaro 2000.

La lastan numeron plej bone solvis:

1-a kategorio: *Martina Gregurić kaj Maja Šušnjar* el Kroatio.

2-a kategorio: *Samanta Čajinić kaj Natalija Đeri* el Kroatio.

3-a kategorio: *Aneta Velkovska* (Makedonio), *Janet Tidman* (Britio), *Jindřich Tomíšek* (Ĉeĥio), *Martina Gazdek* (Kroatio), *Ratka Andonova* (Makedonio).

Post la dua turniro ĉe la pinto staras:

1-a kat.: *Renata Román* (48,5), *Anita Körmöndi* kaj *Davidó Tóth*. Ĉiuj el HU.

2-a kat.: *Beata Barta* (49,5), *Judita Tondora*. Ambaŭ el HU.

3-a kat.: *Aneta Velkovska* (57,5 el MK) kaj *Janet Tidman* (57,5 el GB).

- 1 *La gepatroj nomis la knab... Petr... . Li fariĝis alt... vir... .* (2 poentoj)
Al-donu la konvenajn fin'ajojn.
- 2 Donu kvar tabel'vortojn, kiuj komenc'iĝas per *ĉi*- kaj skribu ekzemplojn pri ili sen aldoni *ti*-vortojn. (4 poentoj)
- 3 Per afiksoj¹ kreu almenaŭ 12 vortojn el la radikoj *jun-*. (3 poentoj)
- 4 Komplet'igu² la proverbon: (1 poento)
Pli bona pano sen ... ol kuko sen libero.
- 5 Kion signifas la mallongigoj: LKK, ILEI, UN, EVA, TTT, IEI, ZEO ?
Nomu almenaŭ kvar el ili. (2 poentoj)
- 6 Per ekzemploj klar'igu la diferencon inter *ĉesi* kaj *fini*, *ruli* kaj *ruliĝi*. (4 poentoj)
- 7 Kio estas Goo? (3 poentoj)
- 8 Kion vi scias pri Komenio (Comenius)? Tri faktoj sufiĉas. (3 poentoj)
- 9 De ekster-lande vi volas sendi bild'karton hejmen, sed ne scias la afrankon.
Kion vi demandas? (4 poentoj)
- 10 Donu almenaŭ du sinonimojn³ por *kombini*. (2 poentoj)
- 11 Kiuj radio-stacioj internaciaj el-sendas ĉiu-tage en Esperanto? (2 poentoj)

La solvojn sendu al: *Raita Pyhälä, Jykyrintie 3, FI-69440 Lestijärvi, Finnlando*
Ret'adreso: <raita.pyhala@lestijarvi.fi>

1. vortfar'ioj kiel *ge-*, *bo-*, *-ist*, *-eg* ... / 2. faru sen-manka / 3. sam- aŭ simil'sencajn vortojn

Solvoj de la antaŭa numero (n-ro 2)

1. turo, torto, litero, trilo, lito, loti, lato, ruli, talio, roli, arto, relo, eliro...*
 2. *Brazilo, demono, ekzemplero, revizoro, benzino, misio, fiziko, okulo, siringo**
 3. dis-kon'igi, dis-fam'igi, heroldi, publikigi, publici, sciigi, reklami, avizi...
 4. mal-esperi, esper'eble, esper'ema, malesper'inda, esper'iga, Esperanto...
 5. ... *kun lia amikino*. / ... *al sia domo*, / ... *sian patrinon*.
 6. Amiko de amiko *estas ankaŭ amiko*.
 7. *letero* - poŝtaĵo, *litero* - skriba signo de parol'sono, *meso* - di'servo, *mezo* - centro, *tusi* - spasme el-igi aeron, *tuŝi* - delikate sur-meti manon
 8. Ĉu vi ne deziras ekskursi kun mi per biciklo al la montoj?*
 9. Brazilo, Italio, Togolando, Kroatio, Francio, Usono, Ĉilio, Japanio ...
 10. Sidney, Aŭstralio.
 11. Kontralte, Faktoj kaj Fantazioj, Virino ĉe la landlimo, Okuloj...
- * signifas ke ekzistas ankaŭ alia ĝusta solvo.

SOLIDARAJ TAGOJ • 30 junio - 5 julio 2000 Saint-Chamond [Sen Ŝamon]

En la escepta jaro 2000 Saint Chamond (urbo inter Lyon kaj Saint-Etienne) festos la est'ont'econ de la hom'aro. La festo kun-igos solidarecajn¹ kaj humanismajn² asociojn³ kaj la lokan loĝ'ant'aron. En tiu medio la esperantista junul'aro havas okazon montri siajn solidarecajn spertojn kaj kune oferti ion al la ekstera mondo.

Bela vid'ajo, gast'ejo, tend'um'ejo, restoracio⁴, sport'ejoj rande de la natur'parko "Le Pilat". Praktikajn informojn petu de:

Solidaraj Tagoj, p/a JEFO, B.P. 3019, FR-69394 Lyon Cedex 03, aŭ rete: <festo@esperanto.org>.

2 festivaloj en Francio

Kultura Arta Festivalo de Esperanto (5 - 9 julio 2000) Toulouse [Tuluz]

Po du/tri spektakloj⁵ vespere kaj diversaj programoj posttag'meze (pup'teatro, kanzono⁶, forumoj⁷, hor'kanta⁸ staĝo⁹, ktp.). La programo en-tenos la plej multajn nun-tempajn E-grupojn ĉiu-stilajn el diversaj landoj: rok'muziko, varieteo¹⁰, teatro, kanzono... . La spekt'ejo situas meze de vasta parko, en kiu staros tend'ego., manĝo- kaj trinkobudoj¹¹. Por informoj turnu vin al: KAFE, p/a Esperanto Kultur Centro, 1 rue Jean Aillet, FR-31000 Toulouse,

aŭ rete: <eurokka@esperanto.org>.

Tuj post KAFE estos labor'brigado¹² por arkeologia¹³ esploro de kastela¹⁴ mont'eto en Pireneoj de la 10-a ĝis la 17-a de julio (Claude Fressonnet, FR-09600 Montbel).


1. solidareco: sento pri komun'eco de intereso / 2. humana: nobla, inda je la nomo de homo / 3. asocio: grava societo / 4. publika manĝo-loko kontraŭ pago / 5. intereso-kaptaj vid'ajoj / 6. kant'ata vers'ajo / 7. publika diskut(ejo) / 8. horo: aro de kant'antoj / 9. tagoj, dum kiuj oni trejnias sin pri io / 10. spektaklo el diversaj amuzaj programeroj / 11. simpla konstru'ajeto ne por loĝi en ĝi / 12. organiz'ita grupo de personoj por kune labori / 13. arkeologio: scienco pri antikva epoko / 14. kastelo: bel'ega konstru'ajo ekster-urba.

MI PARTOPRENIS KONGRES'ETON

Ju pli ni proksim'iĝis al Berlino, des pli mi nervoz'iĝis. Laŭ la listo, kiun mi jam antaŭe ricevis, mi sciis, ke venos kelkaj miaj kon'atoj de la pas'inta Kongreseto en Francio.

Ni al-venis al la kongres'ejo, de kie la gvid'antoj akompanis nin al la Diabla Lago, kiu situas en arbaro. Ni marŝis sufiĉe longe por atingi nian celon. Kabanetoj, en kiuj ni loĝis, estis malgrandaj kaj simpatiaj. Mi ŝatis ilin. Miaj kunloĝ'antoj estis *Clemens* el Germanio kaj *Zsolt* el Hungario. Ĉiu-tage ni havis riĉan programon: ni ludis, kantis, marŝis tra la arbaro, naĝis, vizitis Potsdamon...

Ĉar ni loĝis apud Diabla Lago, estis mem-kompren'eble, ke ĉiuj niaj okupoj kaj ludoj rilatis al diabloj kaj legendoj pri la Diabla Lago. Eĉ la gepatroj, kiuj



venis viziti nin, devis "diabl'iĝi". Estis diable interesa, sed ankaŭ diable mallonga semajno, kaj nun mi devas diable longe atendi novan okazon por renkonti miajn "diablajn ge-amikojn kaj gvidantojn".

David Rey Hudeček (12-jara), Kroatio

Internacia Infana Kongreseto en Azio

La venonta IIK okazos en Israelo, sam'tempe kun la UK, do, de mardo, la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto. Ĝi certe estos malpli granda ol tiu, pri ki vi ĵus legis, en Germanio. Sed ni jam laboras, por ke ĝi havu interesan kaj agrablan programon. Se ni mal-kaŝas, ke la nova gvid'anto de IIK estas *Stefan MacGill*, la iama redaktoro de *Juna Amiko*, vi komprenas, ke ŝkeĉoj, aktor'ado kaj rolludoj abundos.

IIK okazos en junul'ara vilaĝo, Hadassim, 30 kilometrojn nord-oriente de Tel-Avivo, apud Netanja, konstru'ita sur 40-hektara tereno. Buso portos la infanojn de kaj reen al la UK-kongresejo, ankaŭ al tuttaga ekskurso kaj vizitoj al la maro kaj al akvo-parko.

IIK-ejo mem estas internacia lernejo kun propraj manĝejoj, dorm'ejoj por 550 lernantoj, biblioteko, gimnastik'ejo, ekstera infan'lud'ejo, naĝejo kaj komput'ila ĉambro. La atend'ebla temperaturo estos inter 28 kaj 31 gradoj tage kaj 22 gradoj nokte. Ni mal-fermas hejm'paĝon por IIK, kie interes'iĝ'antoj povas anonci sin. Inter-tempe, gepatroj aŭ instruistoj kun E-parol'antaj infanoj inter 6- kaj 13-jaraj bon'volu anonci sin ĉe la administra adreso (paĝo 26) de *Juna Amiko* por ricevi aliĝ'ilon kaj informojn. (smg)

Ĝis post la mezepoko, por kalkuli la homo ankaŭ ne havis kalkul'maŝinojn, komput'ilojn, kiuj estas tre praktikaj kaj rapidaj kalkul'iloj.

Oni pret'igis kaj uzis kalkul'tabelojn por multipliki, dividi, trovi la potencon¹, ktp (=kaj tiel plu) kaj ankaŭ uzis eĉ proprajn korpo-partojn (precipe la man'fingrojn).

Kelkaj matematik'istoj atribuas² la suban multiplikan³ manieron – kiu ne estas simpla, sed vere kurioza⁴ – al la antikvaj rusaj kamp'aranoj, kiuj uzis ĝin ĝis la unua mond'milito.

La afero konsistas en tio, ke oni du-on'igas unu el la multiplik'antoj (sen konsidero al la nombro ĉe la divido, kiam la multiplikanto estas ne-para) kaj sam'tempe oni du-obl'igas la alian multiplikanton.

La duoniga kaj duobliga operacioj ripetigās ĝis la apero de la nombro 1 en la duoniga kolumno⁵.

Fine, oni adicias ĉiujn nombrojn de la duobliga kolumno, kiuj rilatas al neparaj nombroj en la duoniga kolumno. La sumo estas la produkto⁶.

Ekzemplo: Kalkulu 45×64 .

Duonigo	Duobligo	Sumo
45	64	64
22	128	–
11	256	256
5	512	512
2	1024	–
1	2048	2048
<i>Do $45 \times 64 =$</i>		2880

Kaj nun provu vi mem fari 97×125 kaj 32×71 laŭ tiu ĉi maniero!
Estis malsimple, ĉu ne?

Evandro de FREITAS, Brazilo

1. specialan obl'ig'adon kiel, ekzemple, 10^3 / 2. ligas al ies nomo / 3. obl'ig'ado / 4. surprize interesa / 5. aro da ciferoj, vortoj unuj sub la aliaj / 6. multiplik'ajo.

Rubriko por
la plej et-aĝaj
esperantistoj

stefan.macgill@galamb.net


Redakt'ata de
Stefan MacGill
pf. 193
HU-1368 Budapest
Hungario



Post multaj jaroj da sin-dediĉo kaj energio, la fond'into kaj gvida lumo de la projekto "Infanoj Ĉirkaŭ La Mondo" trans-donis la torĉon al nova gvid'anto:

Darlene Evans, 1210 E 2nd Ave, Apt. 2, Indianola IA 50125, USA.

La fondinto estas kon'ata al miloj – kaj ne nur infanoj – ĉirkaŭ la mondo. Nia gazeto esprimas grandegan dankon kaj admiron al **Charlotte Kohrs**, cert'ig'ante, ke ĝi helpas en plu-viv'ig'ado de la tut'monda rondo por et-aĝ'uloj.



Saluton, mi estas **Okulo!** Kie mi loĝas? Kie mi nask'iĝis? En la sama loko! En libro. Libreto. Ĝia titolo: '**Okulo**'. Jes, ĝia titolo estas sama kiel mia nomo. Mi ne scias, ĉu mi ricevis mian nomon de la libro, aŭ oni nomis la libron laŭ mi. Ĉiu-okaze, **Okulo** loĝas en '**Okulo**'. En mia loĝejo estas 40 paĝoj, pluraj el ili estas bele koloraj.

Kiel mi naskiĝis? Nu, **Monika MOLNÁR** min desegnis. Inter ŝiaj multaj belaj bildoj loĝas 280 vort'radikoj kaj vort'eroj. Pli ol 40 el ili estas verboj. Mi ŝatas verbojn, per ili mi estas

tre aktiva! Kun la aliaj rol'uloj mi kantas, dancas, kuras, ludas, laboras, skribas leterojn, uzas komput'ilon, kap'staras, salutas vin...

Kial mi naskiĝis? Por helpi al junaj homoj lerni Esperanton. Ĉefe, al lerneĵ'anoj, kiuj partoprenos en la tut'monda projekto **Interkulturo**. Por ke ili korespondu kaj sendu komputilajn mesaĝojn unu al alia, ili devas unue havi komunan lingvon. Mi kaj miaj amikoj instruos al ili tion. Post du paĝoj, mi prezentos al vi unu el tiuj amikoj, kiu loĝas kun mi en '**Okulo**'.

Mi estas Okulo, do mi bone vidas. Tial mi diras:

"Ĝis revido!"




DE KIE ili venas?

NORDO, SUDO, ORIENTO, OKCIDENTO

Venis de polus¹ eskim'
tra ĝardena pordo.
Diris li (per bona rim²):
“Aperis mi de nordo!”



Venis de glaci' pingven'
En bela fraka³ nudo,
Proklam'ante⁴ dum al-ven':
“Mi vagis⁵ el la sudo!”



Venis el dezert' vaker⁶,
Okazis akcidento.
“Kuglo⁷ pelis tra l' aer'
Nur min el okcidento!”

Venis el pagod⁸ guru⁹
Per transcenda¹⁰ vento
Kaj principoj de Kung Fu
Por ŝveb' el oriento!

La tekston verkis:
Stefan MACGILL

Venis el la ter' palpet'
Kvinono de la klubo.
Prezent'ante sin talp'et¹¹,
“Mi venis el la subo.”

La melodion
verkis:
Perlo MIELA



Venis mi pro kapa pist¹²,
Ĉar batis botoj du pro
Fal' de para-HA-ŝut'ist¹³,
Li venis el la supro!

Dum kant'ado, indiku la direktojn.
Ĉe la interrompa HA en la lasta strofo,
ĉiu batu sian kapon per ambaŭ pugnoj.
Jen, al-venis du-bote la paraŝutisto!


Desegnu la aliajn ven'intojn!

PIED'NOTOJ sur paĝo 21


Por la strofoj 1-5.



1. Ve - nis de po - lus' es - kim'



tra ĝar - de - na por - do.



Di - ris li (per bo - na rim'):



"A - pe - ris mi de nor - do."

Por la strofo 6.



6. Ve - nis mi pro ka - pa pist',



Ĉar ba - tis bo - toj du pro



Fal' de pa - ra - HA - ŝu - tist',



Li ve - nis el la sup - ro!

1. ĉiu el la du punktoj, kie la akso de la ter-globo atingas la ter-supraĵon; kie regas ĉiama frostoj / 2. sam-aŭ simil'son'eco de verso-finoj / 3. frako: vira eleganta jako kun du pend'antaĵoj "vostoj" mal-antaŭe / 4. proklami: oficiale kaj publike anonci / 5. venis, iris kvazaŭ sen difin'ita celo / 6. rajd'anta gard'isto de brutoj en Norda Ameriko / 7. paf'ajo / 8. hinda preĝ'ejo / 9. hinda eklezi'estro / 10. est'anta trans ĉiaj spertoj kaj scioj / 11. preskaŭ blinda mam'ulo kun grize nigra felo, ĝi vivas en la tero / 12. pec'et'igado per ripetaj batoj / 13. paraŝuto: ombrel'forma aparato, kiu ebl'igas mal-rapidan sur-ter'igon el granda alt'eco.

SOLVOJ DE ENIGMOJ sur paĝo 27

FIGUROJ

- 1 — Ĝ
- 2 — Ĉ
- 3 — A
- 4 — F
- 5 — D


SERUROJ

Per la ŝlosilo li povas malŝlosi la seruron 3.

Jen mi revenis, kaj mi re-vidas vin. Mi bone vidas. Nature, ĉar mia nomo estas Okulo. Sed, kial mi nom'iĝas Okulo? Nu, rigardu! Miaj kapo kaj korpo estas rond'formaj. Do, jen du cirkloj. Kaj du cirkloj formas la ciferon 8. Do, mi estas 8-ulo!



De mia libro-loĝ'ejo mi vidas multon. Mi jam diris, ke mi havas bonajn okulojn. Nun mi vidas mian amikon Zumplo. Zumplo estas unika. Nu, li havas unu kapon, kiel vi kaj mi. Sed kiom da okuloj, oreloj, kruroj, umbilikoj...? Kalkulu ilin kaj raportu! Stranga rezulto, ĉu ne?



Li havas sep buŝojn. Utila afero. Li povas manĝi sep glaci'kremojn sam'tempe. Ĉu vi povas fari tion?

Same kiel ĝirafoj, li povas manĝi foliojn aŭ fruktojn de la supro de alta arbo. Sed ĝirafoj havas problemon. Ĝi ne povas facile aŭ elegante manĝi fruktojn de la subaj branĉoj de arbo. Zumplo povas manĝi alte kaj malalte, samtempe. "Bonan apetiton, Zumplo!"



Ses-uloj, sep-uloj, ok-uloj, all'uloj. Venu viziti min kaj Zumpilon en mia loĝejo. Prezo ĉe UEA kaj ILEI: 4,50 EUR. Sesona rabato ek-de 3 ekzempleroj. Triona rabato por libro-servoj, landaj sekcioj de ILEI kaj klasoj en A-landoj de INTERKULTURO!

Ĝis revido!

La HIRUNDO


Oni diras, ke *SANKTA DIMANĈO* havis serv'ist'inon. En iu tago, antaŭ ol iri al la preĝ'ejo, ŝi ordonis al la servistino pret'igi manĝ'ajon. Sed la manĝaĵo estu taŭga por manĝi, nek varma nek mal-varma.

La servistino tuj komencis prepari la tag'manĝon, sed ŝi forgesis meti ĝin flanken por ke ĝi mal-varm'igu.

Kiam *SANKTA DIMANĈO* re-venis hejmen el la preĝejo, ŝi tuj sid'igis por tagmanĝi. Gust'um'ante la manĝaĵon, ŝi vundis al si la lipojn kaj tre koler'igis. Ŝi mal-benis la servistinon far'igi birdo kiu, de nun, vivu en varm'egaj lokoj.

Tuj la servistino fariĝis hirundo kaj de tiam la hirundoj vivas nur en tre varmaj landoj kaj konstruas por si nestojn en varmaj sub-tegmentoj.

Laŭ rumanaj popolaj legendoj: *Eugenia-Ecaterina POPOVICIU*



Ni bezonas viajn konsilojn!

Vi certe rimarkis ke, de jaro al jaro, nia redakcio volas pli-bon'igi la gazeton por servi al vi kiel eble plej efike.

Kiu, se ne vi, povas plej multe helpi? Vi, kiu legas niajn verk'etojn aŭ instru'ante uzas ilin en kurso-horoj.

Vi povus ĝoj'igi nin per al-sendo de via opinio pri pozitivaj kaj negativaj trajtoj de nia revuo. Skribu al ni, kion vi for-igus kaj kion vi al-donus. Kio mankas al vi? Kiel ni povus pli efike helpi vin? Per kio ni povus vin amuzi pli sukcese?

Ni petas vin kritiki¹ kiel la temojn, tiel ankaŭ la lingv'ajon de la tekstoj.

Ne domaĝu temp'eton, informu nin pri viaj impresoj, ni petas.

Ni deziras redakti kun kaj por vi!

La redakcio atendas vian opinion letere (*Juna Amiko, Hítel u.10.fsz.16, H-6000 Kecskemét, Hungario*) aŭ ret'poŝte (*junaamiko@esperanto.nu*).

Kun antaŭ-danko pro viaj bon'vol'emaj konsiloj:

La redakcio

1. ekzameni la bonajn kaj malbonajn ecojn de verko.

Kial la kokoj ekkantas antaŭ ol aperas la suno?

(Legendo¹ el Burundio)

Antaŭ-longe, la suno edz'igis al la luno. Post kelkaj jar'centoj ili jam havis multe da infanoj. Ĉu vi scias, kiel nom'igis tiuj infanoj? Ili estis kokoj kaj steloj. Tamen, la kokoj kaj la steloj ĉiam inter-batalis kaj ilia kverela² bruo ĝenis ĉiujn ĉielajn loĝ'antojn. Pro la bruo de la kverel'emaj infanoj eĉ la suno, kiu estis ilia patro, ne plu volis resti hejme kaj li ĉiam iris hejmen tre mal-frue vespere.

Qam, la suno diris al la luno, sia edzino: «Ĉu vi vidas, kiel viaj infanoj ĉiam koler'igas min? Mi tuj jetos ilin al la tero, por ke ili inter-batalu tie.»

La luno respondis: «La plej kverelemaj estas la kokoj. El-pelu ilin, sed lasu la stelojn apud mi, ili estas trankvilaj.»


«Restu kun ili, se tio plaĉas al vi, sed mi ne plu deziras ren-

konti vin sur mia vojo», diris la suno al la luno. Tiam la suno sin turnis kaj diris al la kokoj: «For-iru kaj neniam re-venu ĉi tien! Iru mal-supren, al la tero kaj lern'igu la homojn kvereli kaj interbatali! Neniam forgesu averti la lunon kaj la stelojn, ĉe ĉiu maten'ruĝo, pri mia al-veno. Mi ne plu deziras renkonti ilin sur mia vojo.»

De tiam la kokoj loĝas sur la tero kaj la luno kun la steloj loĝas en la ĉielo. Kaj de tiu tempo, kiam la kokoj kantas frumatene, ili avertas pri la alveno de la suno, por ke la steloj kaj luno sin kaŝu. Jen tial oni ne povas ilin vidi dum la tago ...

Tradukis: *Michel NKWIRIKIYE*, Tanzanio

1. rakonto pri malnovaj okaz'ajoj, miksa'ajo el realaj kaj ne-realaj faktoj / 2. kvereli: kolere kaj brue inter-diskuti.



Zoran Ĉirić (Jugoslavio)

DESEGN'ADO

Dum leciono de desegnado Vladimir desegnis ĉas'iston kaj leporon. La ĉas'isto pafas el la paf'ilo, eĉ la flug'anta kuglo¹ estas vid'ebla. Kaj, krome, ĉas'hundo kur'egas, preskaŭ atingas la leporon...

– Ĉu vi ne kompatas la lepor'eton? – demandas Svetlana. – Jen kia vi estas! Vladimir rid'etas kaj diras:

– La ĉasisto ne mort'igos ĝin, ne timu! Ĉu vi ne vidas, kien flugas la kuglo? Li mis-trafos!

Kaj vere, oni povas bone vidi sur la desegn'ajo de Vladimir, ke la kuglo mistrafos.


– Sed la hundo kaptos ĝin! – diras Brana. – Vidu, kiel kuregas la hundo, ĝi tuj atingos la leporon.

Vladimir denove ridetas, pens'adas kaj prenas krajonon...

– Mi l'igos la hundon! Jen vidu! – kaj Vladimir desegnas grandan ĉenon² ĉirkaŭ la hunda kolo kaj la alian finon de la ĉeno li "ligas" al arbo kaj ekkrias tiel laŭte, ke la tuta klaso aŭdas lin:

– Savos sin la leporo!

Kaj de benko al benko Vladimir iras feliĉ'ega por montri sian desegnaĵon.



1. paf'ajo / 2. lig'ilo el ar'ego da ferringoj.

- Se vi havas al-iron al Interreto, vizitu TTT-ejon <http://esperanto.nu> kaj klaku sur *La angulo*. Tie vi trovas plurajn, kiuj serĉas korespond'amikojn en Esperanto.

- Deziras korespondi tutmonde la 11-jara *Anna Birjulina*, str. F.Lytkina 24-82, RU-634034 Tomsk, Rusio.

- Kvin 13-14-jaraj francaj geknaboj deziras korespondi tutmonde. Skribu al: *Mikaelo Simon*, 219 Route d'Anduze, FR-30260 Quissac, Francio.

- 13-jara pola knabo volas havi kontakton kun eksterlandanoj. Liaj ŝatokupoj estas komputiloj kaj belaj knabinoj. Adreso: *Adalberto Krasowski*, ul. Burskiego 32 m 17, PL-10-686 Olsztyn, Pollando.

- *Marta García Moreno*, studentino de Kataluna Filologio. Ŝi finis kur-



son de Esperanto en la fakultato pri Filologio de Valencio (Hispanio). Ŝi deziras havi adresojn de esperantistoj tra la tuta mondo por korespondi kaj praktiki Esperanton. Retadreso: margamo@alumni.uv.es

- Kiu deziras korespondi kun eksterlandanoj en fremdaj lingvoj inkluzive Esperanton, skribu al: Hrvatski ferijalni i hostelski savez, Hrvatski Hosteler, Savska 5/1, HR-10000 Zagreb, Kroatio. Retadreso: hrvatski.hosteler@mailcity.com

juna amiko

Internacia Esperanto-revuo de ILEI por lernejanaj kaj komencantoj
26-a jaro, n-ro 4 (91), 1999

Aperas 4 fojojn jare.

Redaktoro: *Géza KURUCZ* (Hítel u.10.fsz.16, H-6000 Kecskemét, Hungario)
Ret'adreso: junaamiko@esperanto.nu

Vicedaktoro: *Stefan MacGill* (retadreso: stefan.macgill@galamb.net)

Abona adreso: Juna Amiko, Pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario

Eldonanto: ILEI, Stenbockensgata 102, SE-136 62 Haninge, Svedio

Lingva revizianto: *André Albault* (Francio)

Kunlaborantoj: *Tatjana Auderskaja* (Ukrainio), *Lisbet kaj Bertil Andreasson* (Svedio), *s-ino Raïta Pyhäälä* (Finnlando), *s-ino Monique Noël* (Francio), *s-ino Jennifer Bishop* (Aŭstralio), *Baldur Ragnarsson* (Islando), *Gennadij Basov* (Rusio), *Bardhyl Selimi Mezini* (Albanio), *Till Dahlenburg* (Germanio), *Rinzo Okumura* (Japanio), *Pekim Tenorio Vaz* (Brazilo), *Evandro de Freitas* (Brazilo), *Zoltán Kurucz* (Hungario), *Dieter Berndt* (Germanio), *Bill Mak* (Ĉinio); *Michel Nkwiri-kiye* (Tanzanio), *Eugenia-Ecaterina Popoviciu* (Rumanio), *Mensah A. Attiogbe-Agbemadon* (Togolando), *José J. Campos Pacheco* (Kubo)


Irina Nagy (Rumanio), *Monika Molnár* (Hungario), *Pavel Rak* (Ĉeĥio) grafikisto

Komputila kolora tekniko: *János Bakk* (Hungario)


Farita en Presejo Saluton

Chinojn u. 20, H-1045 BUDAPEST, Hungario

ISSN 0230 1318



**FIGU
ROJ**



SERUROJ

FIGUROJ

Nur kvin el la liter'itaj figuroj estas egalaj al la numer'itaj.

Kiuj estas tiuj?



(Solve sur paĝo 21)

Rigardu la kvar serurojn. Kiun el ili li povos mal-ŝlosi? (Solve p. 21)



Monbiletoj kaj



moneroj de la
estonteco
en
Eŭropo



Vidu la artikolon

sur paĝo 11!